

Bob Dylan ,

Kiom da mono el-
spezas la mond'

*tradukita de Joachim
Gießner*

Kiom da mono elspezas la
mond'
por bomboj, raketoj kaj
mort' ?
Multaj sin gloras, paradas
per bus',
sufer' nek mildiĝas nek
sort'.

Kiom okazu ankoraŭ mi-
zer',
ĝis venos por savo la vort' ?
Respondas, amik', tutsole
nur la vent',
respondas tutsole nur la
vent'.

Kiom da vojoj en tuta la
mond'
abundas per larmoj, sufer' ?
Kaj oceanoj ĝis mara pro-
fund'
plenplenas per trista mi-
zer'!

Kiom da inoj dum tutsola
viv'
atendas en vea toler' ?
Respondas, amik', tutsole
nur la vent',
respondas tutsole nur la
vent'.

...

Bob Dylan ,

Blowin' in the Wind

How many roads must a man walk
down
Before you call him a man?
How many seas must the white dove
sail
Before she sleeps in the sand?

Yes, and how many times must the
cannonballs fly
Before they are forever banned?
The answer, my friend, is blowin' in
the wind
The answer is blowin' in the wind

Yes, and how many years can a
mountain exist
Before it is washed to the sea?
Yes, and how many years can some
people exist
Before they're allowed to be free?

Yes, and how many times can a man
turn his head
And pretend that he just doesn't see?
The answer, my friend, is blowin' in
the wind
The answer is blowin' in the wind

...

Bob Dylan ,

Kiom da mono els-
pezas la hom'

*tradukita de Manfred
Retzlaff*

Kiom da mono elspezas la
hom'
Por la armilar' sur la ter' ? -
Kaj kiom da vortoj diratas
de li?
Kaj ne malpliĝas mizer'!

Ĉu devos okazi la lasta milit'
Kun neimagebla mizer' ?
Respondon, amik', ja scias
nur la vent',
Repondon ja scias nur la
vent'.

Kiom da stratoj sur tiu ĉi
ter'
Kondukas al senesperec' ? -
Kaj tiom da maroj en tiu ĉi
mond'
Plenplenas de plor' kaj tri-
stec' ? -

Kaj kiom da inoj atendas,
ho ve,
Kaj restas en tia solec' ?
Respondon, amik', ja scias
nur la vent',
Repondon ja scias nur la
vent'.

...

Kiom da homoj en malliberec'
sopiras la ŝanĝon de l' stat'?'
Kaj geinfanoj milionoj dum nokt'
ne dormas pro morda malsat'!

Kiom da homoj noktpetas en rev':
"Ho venu al ni bonas fat'!"
Respondas, amik', tutsole nur la vent',
respondas tutsole nur la vent'.

*Traduko de la Angla poemo "Blowin' in the Wind" de BOB DYLAN (civila nomo: Robert Allen Zimmermann, *1941-05-24) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 - †2003-11-25).*

Arg-720-1449 (2012-12-11 09:50:59)

Troveblas tiu ĉi esperantigo de la kanto-teksto en <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf> sub <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>.
Pri Joachim Gießner vidu la vikipediejon http://de.wikipedia.org/wiki/Joachim_Gie%C3%9Fner.

Yes, and how many times must a man look up
Before he can see the sky?
Yes, and how many ears must one man have
Before he can hear people cry?

Yes, and how many deaths will it take 'til he knows
That too many people have died?
The answer, my friend, is blowin' in the wind
The answer is blowin' in the wind.

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas BOB DYLAN (civila nomo: Robert Allen Zimmermann, *1941-05-24), publikigita 1962-04.*

Arg-720-1446 (2012-12-11 09:07:24)

Pri la aŭtoro, vidu la retejon <http://www.songlexikon.de/songs/blowinwind>, pri la teksto la retejon <http://www.songtexte.com/songtext/bb-dylan/blowin-in-the-wind-2bd5e8d2.html>. La melodio estas aŭdebla en <http://www.youtube.com/watch?v=tG08snK98l0> kaj en http://www.myvideo.de/watch/3594984/BOB_DYLAN_BLOWIN_IN_THE_WIND.

Kiom da homoj en malliberec'
Suferas nur pro opini'?' -
Kaj kiom da homaj infanoj, ho jes,
Malsatas sur ter tiu ĉi?

Kaj kial la revoj sur pac' sur al ter'
Ne efektiviĝas sur ĝi?
Respondon, amik', ja scias nur la vent',
Repondon ja scias nur la vent'.

*Traduko de la Angla poemo "Blowin' in the Wind" de BOB DYLAN (civila nomo: Robert Allen Zimmermann, *1941-05-24) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1984-04-29.*

MR-148-1 / Arg-720-1447 (2012-12-11 09:05:35)

La melodio de tiu ĉi kanto, kiun verkis la aŭtoro Bob Dylan (civila nomo: Robert Allen Zimmermann) ankaŭ, aŭdeblas en <http://www.youtube.com/watch?v=tG08snK98l0>.
Pri la muziknotoj vidu: <http://de.scribd.com/doc/9589786/Bob-Dylan-Blowin-in-the-wind-notes>.